nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2011

## DISVOLVIĜIS EN NIA REGIONO LA 70a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La 70-a Hispana Kongreso de Esperanto disvolviĝis inter la 28-a de junio kaj la 2-a de julio en nia regiono, en la historia urbo San Lorenzo de El Escorial. Kiel kongresejo taŭgis la Kulturdomo, malnova konstruaĵo, kiu unue servis kiel Domo de Metioj, apud la Monaĥejo.




La programo disvolviĝis laŭ la titolo: *"Esperanto 3.0 – E-agado en la 21a jc / En esperanto en el siglo XXI"*. La kerno de la programo celis analizi kaj utiligi la novajn eblecojn de komunikado kiun la nuna epoko ebligas al la parolantoj de nia lingvo.

Kiel ekzemplo de tiu nova maniero komunikiĝi, la kongreso estis parte elsendita en la reto, en rekta maniero, por ebligi la partoprenon de homoj kiuj ne povis ĉeesti en la kongresejo mem. La retaj partopenantoj povis komenti kaj sendi siajn mesaĝojn al la surlokaj organizantoj.

La inaŭguron partoprenis la unua Vicurbestro de San Lorenzo, Isabel Torres, kiu salutis la kongresanojn kaj invitis ĝui la urbon. Nome de Madrida Esperanto-Liceo salutis ĝia prezidanto, Juan Antonio del Castillo.

Ankaŭ Juan nome de Liceo partoprenis ĵaŭdon vespere en programero, en kiu eblis prezenti asociojn kaj eventojn.

Ene de la kongreso eblis trapasi oficialajn ekzamenojn de Esperanto laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro, je ĉiuj tri ekzistantaj niveloj: B1, B2 kaj C1, kaj ricevi diplomon de la ŝtate agnoskata hungara ekzamencentro ITK. Ekzameniĝis 11 homoj. La finaj rezultoj ankoraŭ ne estas konataj sed jam surloke oni informis, ke la parolan parton sukcesis ĉiuj!

### MALFERMA PROGRAMO

Parto de la programo de la Kongreso estis malfermita al la ĉeesto kaj partopreno de la loĝantoj de la urbo, eĉ se ili ne estis esperantistoj. Ĝuste post la inaŭguro, plektrorkestro "Calle del Barquillo" prezentis al ni koncerton, inter alie kun tradiciaj muzikpecoj de la regiono. Ankaŭ ceteraj muzikaj koncertoj estis malfermaj al la publiko.

Ene de kutima programo en la Kulturdomo, pri hispana kinarto, oni elsendis la filmon "El coche de pedales" (*La pedalaŭto*), de Ramón Barea, kie Esperanto havas signifan rolon.

Dum la matenoj de merkredo, ĵaŭdo kaj vendredo estis programita rapida kurso por komencantoj. Fine, okazis prelego pri Esperanto en la hispana lingvo.

### MUZIKAJ KONCERTOJ

Krom la menciita plektrorkestro, oni kalkulis je tre altkvalitaj muzikaj grupoj kaj kantistoj. La Kvaropo Sinkopo, kiu unuafoje prezentiĝis dum la madrida Zamenhof-Tago, faris koncerton de kvarvoĉaj kantoj en Esperanto, el diversaj tradicioj.

La pola *bardo sen barbo* Georgo Handzlik montris al ni siajn kantojn, amuzajn, distrajn kaj pensigajn pri la Esperanto-movado. La merkredon li estis jam prezentinta sian teatran spektaklon "Ludoviko Lazaro", kun scenoj de la vivo de Zamenhof.

La dana muzikisto Kim Hendriksen fermis per sia koncerto la kongreson dum la sabata vespero kaj ankaŭ prelegis pri rokmuziko en Esperanto.

### ATELIEROJ KAJ PRELEGOJ

Gravan parton de la programo konsistigis praktikaj atelieroj, gvidataj de pluraj elstaruloj de nia kulturo. Antonio Valén pri tradukarto, Miguel Fernández pri deklamado, Jorge Camacho pri poezio, Miguel Gutiérrez Adúriz pri tradukado de kantoj kaj produktado de filmetoj, Kani (José M. Salguero) kaj Andy Hernández pri Vikipedio, Juan del Castillo pri masaĝado.

Toño del Barrio prezentis filmojn utiligantajn diversmaniere Esperanton, Pedro Hernández prelegis pri Mongolio kaj Félix Jiménez pri socia ekonomio. Pedro Sanz prezentis diversajn librojn kaj ankaŭ zorgis pri la Libroservo dum plejparto de la kongrestagoj.

Miguel Á. Sancho prezentis diversajn agadojn de HEF en la reto, kaj Ana Manero la Projekton *Bitoteko*, propono kunkrei ciferecan bibliotekon inter pluraj esperantaj bibliotekoj kaj asocioj.

Alia tipo de prelegado estis organizita dum la vespero de la sabato, en la formo de *peĉakuĉo*, kiun pluraj liceanoj konas ĉar ĝi estis jam uzata dum pasinta Zamenhof-Tago. Ĝi konsistas el rapida sinsekvo de prelegoj, utiligante bildojn kiuj nur montriĝas dum mallonga tempo.

Tuj poste, debato inter Renato Corsetti kaj Jorge Camacho, moderigata de Toño del Barrio, permesis al ili prezenti siajn malsamajn vidpunktojn pri lingvo kaj movado.

### TURISMAJ VIZITOJ

Ne mankis turismaj programeroj. La unuan tagon estis organizita promenado tra la urbo San Lorenzo de El Escorial. La sekvan disvolviĝis ekskurso al Avilo (Ávila), kaj la ĵaŭdon grimpado al proksima montaro. Vendrede, kaj danke al la kunlaboro de la urbestraro kaj la Nacia Organizo pri Nacia Heredaĵo (*Patrimonio Nacional*), oni organizis por ĉeestantoj specialan gvidatan traviziton al la fama Eskoriala Monaĥejo, kun samtempa tradukado en Esperanto.

La dimanĉon 3-an de julio oni programis postkongresan viziton en la historia centro de la ĉefurbo Madrido, klere gvidata de Félix M. Jiménez.

### EKSPOZICIO

Antaŭ la komenco de la Kongreso, vojaĝis al San Lorenzo de El Escorial la paneloj kiujn HEF pretigis pri nia lingvo, kaj kiujn jam antaŭe estis montritaj en aliaj urboj. Inter la 13-a kaj la 30-a de junio la ekspozicio estis montrita en la kulturcentro de la strato Vista Bella, kie troviĝas la Muzika Lernejo kaj Biblioteko. La 1-an de julio ĝi estis translokigita al la kongresejo mem.

## GRAVA ANONCO

Dum la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio, okazinta tuj post la kongreso, estis nomumita prezidanto de HEF por venonta jaro la ĝisnuna redaktoro de *Nia Voĉo*, Toño del Barrio. Por adekvate plenumi la novan funkcion, li manifestis sian deziron forlasi aliajn respondecojn en aliaj asocioj.

Tial, oni serĉas novan redaktoron por la bulteno. Kandidatoj anoncu sin ĉe la adreso de MEL.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversaciaj rondoj estos interrompitaj dum la monato aŭgusto. Pri novaĵoj, atentu la diskonigojn en la retforumo http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com